

Sendu pluve sur la teron
SPUŚĆCIE NAM NA ZIEMSKIE NIWY
ADORU 197

1. «Sen-du plu-ve sur la te - ron
 Li for - i - gu la mi - ze-ron.»
 la Sa - van-ton, nu - ba on - do.
 Ti - el jam vo - ka - dis mon-do.
 Ki-am post A - da - ma kri-mo
 es - tris mort', sa - ta - no, ti - mo,
 ti - am ho-mon ĵe - tis sor - to
 for de l' pa-ra-di - za — por-do.

2. Sed la Patro ekkompatis
 je mizera homa faro.
 Venis Filo, kiu volis
 sin oferi por l' homaro.
 Kaj anoncis el ĉielo
 al Maria Gabrielo:
 «El Spirit' vi bebon havos,
 kiu Izraelon savos.»

3. Se hodiaŭ preĝas homo,
 ekkompatos Patro Dio,
 venos pac' en Krista nomo
 kaj ekregos harmonio,
 kaj triumfos Di-Spirito,
 falos pek', satana mito. –
 Estu do Kristnasko nia,
 kia festis ĝin Maria.